
# FANZERANTO

Jaro 12 - Numero 12 - Poŭzalegro - Brazilo / Junio - Julio 2021



# LA PLEJ POPULARA PODKASTO DE ESPERANTUJO








## TERURA VIZIO

SYLVAIN-RENÉ DE LA VERDIÈRE

la verda skarabo




Saluton karaj!

Finfine ni revenis! Fakte mi neniam intencis realdoni ĉi tiun revueton, sed ekde de la pasinta eldono multaj aferoj okazis kaj mi vidis ke Fanzeranto bezonus esti revivigata, do ni denove klopodos verki kaj arigi kelkajn informojn al nia legantaro. Se vi volos apogi nian senpagan revueton, informu min, certe kun financa apogo ni povos plibonigi ĝin, kaj espereble, verki aliajn numerojn. Ĉu vi havas Esperantan entreprenon kaj volas aperigi propagandon ĉi tie? Voku nin, ni havas specialajn valorojn por Esperantaj entreprenoj aŭ projektoj.

---

En ĉi tiu numero oni havos bonegan intervjuon pri la granda febro kaj mirinda novaĵo en Esperantujo kiu estas la podkasto "La Malfamuloj", ili uzas Esperanton por paroli pri tabuaj kaj neordinaraj aferoj, certe vi jam konas ilin ĉar kontraŭe la nomo la fameco jam atingis ilin. En nia nova numero ni laboras kun nova partnero kiu prezentos bongustajn kaj veganajn receptojn, ĝi estas Verda Skarabo, mi ne dubas ke vi volos reprodukti ĉi tiun bongustaĵon. Vi ankaŭ legos ĝuindan tekston de la verkinto de La Civito de la Nebuloj.

## Enhavo

LA FAMAJ MALFAMULOJ 3

TERURA VIZIO 6

LA VERDA SKARABO 7

Jaro 12 - Numero 12

Organizanto: Fabjo Silva

Diagramado: Presi Mídia Impressa e Digital

Bildoj: OpenClipart kaj OpenVector

Revizio: Antônio Carlos de M. Mederos, Jésus O. Martinez e Couto kaj Janel S. Wiśniewski

Ankaŭ helpis nin en ĉi tiu eldono: Carlos Fernando Hernández Loarca, Sylvain-René de la Verdière kaj Andy Hernandez Martínez .

Fanzeranto estas sendependa organo; la opinioj de niaj kunlaborantoj, **ne ĉiam**, spegulas la niajn.

fanzeranto@gmail.com

# LA FAMAJ MALFAMULOJ

Bildoj: Dosieroj de la aŭtoro.













Trovu sekretajn mesaĝojn sur la bildo de la epizodoj.

Senlimaj, senhontaj, sentabuaj kaj ege mojosaj, ili estas La Malfamuloj kaj por inaŭguri la novan tempon de Fanzeranto ili estos intervjuataj. La plej populara podkasto de Esperantujo.

# Mojoseco kaj fuŝeco! La Malfamuloj.

Hodiaŭ Fanzeranto havas en sia teo-ĉambro gastojn ege malfamajn. Pluraj el vi ankoraŭ ne sciis pri ĉi tiuj gastoj, kaj volos demandi kial mi perdas mian tempon (kaj vian ankaŭ) per intervjuo tiom malnecesa. Nu, tiel estu kaj min ne surprizos ricevi kelkajn emociplenajn respondojn en mia poŝtejo hejme. Sed des pli bone ne furiozu kontraŭ ni, prefere simple malstreĉiĝu kaj lasu ĉi tiujn malfamulojn paroli kun ni, por ke ni mem povos diri al vi pri nia opinio, kaj tiel ne devos aŭskulti ilin vi mem.

**Fanzeranto: Kio pri la Malfamuloj?**

**La Malfamuloj:** Nu, kio pri vi? Tion mi demandas. Kion mi povus diri pri la Malfamuloj, do, ili naskiĝis tuj post la Unua Virtuala Malkongreso de Esperanto, en malriĉa vilaĝo nomita "Facebook". La malfamuloj estis Pietro kaj Carlos, sed poste la kvanto kreskis per la apero de iliaj gastoj: Alekĉjo kaj Itzja. Onidire, kaj laŭ la statistikoj de "Spotify" (muzika kaj podkasta platformo kie aperas nia podkasto "La Malfamuloj" ĉiu-vendrede tagmeze de Brazilo), la malfamularo estas ja pli vasta ol ni atendis ĝin.

**F: Jes, sed kion vi faras? Pri kio ĝi temas?**

**LM:** Nu, ni faras podkaston, freŝan kaj – mi esperas – ridigan. Sed ne nur tio, ni ankaŭ uzas tiun platformon por paroli pri tio kion ni ŝatas kaj kion ni ne ŝatas, pri la movado, pri la klaĉoj ene de Esperantujo, pri scienco kaj pseŭdoscienco, pri eksterteranoj kaj religioj. Ĝi estas simpla babilado, honeste komentita sen bezono esti ĉiam politike ĝusta, nur pro tio ke ni trovas pli da ĝojo kaj respondo pere de natura interago. Nu...resume, ni faras podkaston pri ni parolantaj, ĉar ni scias ke niaj opinioj estas ege (ege) nenecesaj.

**F: Kion vi opinias pri aliaj podkastoj en Esperantujo?**

**LM:** Ĉu vi volas nian opinion pri niaj samartanoj? Nu, honeste ni povas diri ke ni admiras ĉiujn podkastfarantojn, ĉar ni scias ke ĝi ne estas facila tasko, ĝi postulas horojn da editado, horojn por antaŭ-plani ĝin, kaj bonan volon labori senpage. Fakte, pri tio ni jam parolis antaŭe, pri la tendeco de la esperantistoj por labori volontule, sed vi ne demandis al mi pri tio nun, do pli bone iru aŭskulti la trian epizodon de la podkasto. Pri la aliaj podkastoj, ni ŝatas kelkajn, ni aŭskultas kelkajn, kaj kompreneble ni ne tiom ŝatas kelkajn aliajn. Sed tial ankaŭ ni kreis la Malfamulojn, por havi pli da elekto inter la tre malgranda kvanto da mediaj distreblecoj. Esperantujo estas ankoraŭ malgranda komunumo, sed tio ne signifas ke ni ne bezonas televidon, radion aŭ konkursojn; la mediaj distreblecoj estas parto de komunumo kaj de kulturo, des pli digitalaj kulturoj, kiel nia. Laŭ mi ne eblas diri ke nia komunumo estas jam plena, se ni ankoraŭ ne havas bonajn distrajn eblecojn.

**F: Ĉu via publiko estas preta por aŭskulti pri la temoj kiujn vi traktas?**

**LM:** Tute jes, esperantistoj ne estas kvinjaraj infanoj kies memestimo dependas de opinioj de aliaj. Aldone, ni ĉiam traktas temojn jam menciitajn en aliaj platformoj, ni parolas kaj ĉefe kritikas ĉies opiniojn, eĉ niajn! Ĉar ni kredas ke kritiki ĉion helpas homojn pridemandi siajn proprajn opiniojn kaj esti pli memkonsciaj. Aldone, plejeble ni reprezentas tiun personon, kiun konservemaj dekstruloj malamas: en nia voĉo oni ĉiam aŭdos pri kritikoj al la movado, pri eksterteranoj, pri kontraŭleĝaj substancoj, pri la GLAT-komunumo, pri la veganoj, pri Jesuo kaj Mahometo, kaj pri kio ajn ĉagrenu la konservemulojn. Esperantujo plenas je ĉiaj personoj, kaj se iu venas kaj aŭskultas nian podkaston, eble oni ŝatos aŭ ne, sed almenaŭ oni jam scios pri la ekzisto de kelkaj eblecoj por distriĝi kaj aŭskulti iom da Esperanto, kiu ne temus pri Esperanto mem.

**F: Ni aŭskultis ke vi kritikis TEJOn kaj la Esperantan Civiton. Kiu estas via problemo kun la reguloj kaj aŭtoritatoj?**

**LM:** Nu, aldone al ĉio antaŭe menciita, ni povas iomete konsideri nin anarĥiismajn. Sed ne pensu pri ni kiel tiuj (kuraĝaj) frenezuloj kiuj ĵetas molotovajn koktelojn al policistoj. Ankaŭ ne pensu pri ni kiel filozofiaj aŭtoritatoj, tute ne! Ni nur ŝatas kritiki la regulojn, la limojn de la kulturo, la limojn de la Esperanta komunumo. Ĝi tute ne estas problemo kun la personoj kiuj laboras en TEJO, ĝi estas pri la instanco mem, pri la koncepto de TEJO, kiu ne plene funkcias laŭ nia persona vidpunkto. Ni kredas ke ĉiuj bezonas iom da kritiko por scii kion ŝanĝi kaj kion plibonigi, malbonŝance ni nun vivas en historia momento kie ĉiuj kritikoj signifas tro. Antaŭlonge, la kritikoj vojaĝis de laboranto al laboranto, de studento al studento, ili ricevis apogon de kelkaj aliaj familianoj, samklasanoj kaj tiel, la kritiko iĝis publika opinio, kaj tiel la opinio venis al amaskomunikiloj kie ili kontraŭstaris aŭ apogis ĝin, signifante kontraŭstari aŭ apogi la publikon. Nun la kritikoj alvenas tuj al kritikatoj, kaj ili ne permesas la kritikon kreski inter la publiko – tiam ĝi neniam iĝas opinio –, ĉar ili povas kontraŭstari ĝin antaŭ ĝi kreskas sufiĉe kaj movigas ŝanĝon. Ni ne havas problemon kun la



Carlos Fernando Loarca



reguloj mem, ni havas kritikon pri kiel oni faras la aferojn kaj kial tio malhelpas la plej vastan disiĝon de la lingvo. Kaj la Civito estas nenia aŭtoritato, ne estu ŝerca.Bezonas iom da kritiko por scii kion ŝanĝi kaj kion plibonigi, malbonŝance ni nun vivas en historia momento kie ĉiuj kritikoj signifas tro. Antaŭlonge, la kritikoj vojaĝis de laboranto al laboranto, de studento al studento, ili ricevis apogon de kelkaj aliaj familianoj, samklasanoj kaj tiel, la kritiko iĝis publika opinio, kaj tiel la opinio venis al amaskomunikiloj kie ili kontraŭstaris aŭ apogis ĝin, signifante kontraŭstari aŭ apogi la publikon. Nun la kritikoj alvenas tuj al kritikatoj, kaj ili ne permesas la kritikon kreski inter la publiko – tiam ĝi neniam iĝas opinio –, ĉar ili povas kontraŭstari ĝin antaŭ ĝi kreskas sufiĉe kaj movigas ŝanĝon. Ni ne havas problemon kun la reguloj mem, ni havas kritikon pri kiel oni faras la aferojn kaj kial tio malhelpas la plej vastan disiĝon de la lingvo. Kaj la Civito estas nenia aŭtoritato, ne estu ŝerca.

**F: Kiel vi laboras? Kiel oni faras la podkaston? Kiel oni decidas pri la temoj?**

**LM:** Ni registras merkrede matene por Carlos kaj tagmeze por Pietro, do ili loĝas en malsimilaj landoj. Ili lunde rigardas la kalendaron kaj vidas ke jam tiam estas lundo kaj ke ili ankoraŭ ne decidis pri la temo de la merkreda registro, do ili mesaĝadas per "WhatsApp" kaj je la fino decidas pri epizodo je du aŭ tri temoj: unu esperanta, unu malesperanta kaj alia eble meze esperanta. Tiel, ekzemple, ni havas epizodojn kiel "Sektoj kaj Stultaj leĝoj" kie ni parolas pri usona sekto nomita NXIVM komparante ĝin kun la Esperanta Civito, poste, danke al stultaj leĝoj de la Esperanta Civito, ni parolis pri strangaj leĝoj de pluraj landoj. Ni diru ke plejmulto el nia podkasto estas tiumomente pensita, kaj eble 90% improvizita. Ni registras ĉiam pli-malpli 50 minutojn.

**F: Vi menciis la Virtualan Malkongreson, kiu ankaŭ estis iomete kritika kaj malsimila afero, ĉu vi havas aliajn planojn nun?**

**LM:** Nu, fakte, ni havas ja aliajn projektojn, ni nun povas paroli pri alia podkasto kiu estos pli koncize pri ateismo kaj religioj, sed pri tio ni ankoraŭ bezonas tempon. Aldone ni havas duan parton de tiu Virtuala Malkongreso kiun vi mencias, ni nun organizas niajn kalendarojn por ripeti la duan parton de la Malkongreso dum oktobro aŭ novembro ĉijare, kaj kiel en la pasinta fojo, ni volas denove trakti ĉion ajn krom Esperanto aŭ gramatiko: Se vi volas paroli pri astronomio kaj fiziko, antaŭen. Se vi volas proponi reformon por nova skribsistemo, iru merden. Se vi volas montri al ni kiel uzi Ĥaosmagion, do antaŭen. Se vi volas paroli pri la E-movado en via urbo, iru kacen. Se vi volas laŭtlegi erotikajn poemojn, plej antaŭen. Se vi volas montri kiel la biblioteka kurso sukcesis instrui Esperanton al du personoj, iru bugri vin mem. Do, ni denove invitas ĉiujn mojosulojn, kiuj bone konas multe pli ol pri gramatiko kaj esperanta instruado, ni invitas tiujn kiuj konas pri scienco, kiuj komunikiĝas kun spiritoj, kiuj pentras pejzaĵojn, kiuj faras muzikon, kiuj naĝas kun ŝarkoj, kiuj komediemas, kiuj tatuas, kiuj havas propran negocon. Ni volas inviti vin paroli pri tio kio movigas vin, kio inspiras vin...krom Esperanto.

**F: Do, alia podkasto, sed, ĉu vi planas fari jutubkanalon aŭ aliajn vivelsendojn?**

**LM:** Honeste, ni ege ŝatas la fakton ke niaj vizaĝoj ne aperas sur video, ĉar tio postulus multe pli grandan laboron. Ne, vivelsendoj kaj "Youtube" kanalo nun ne estas en niaj planoj por la Malfamuloj. Certe ja por la Malkongreso, kiu okazos samkiel pasintjare, per "Facebook" vivelsendoj. Kaj ĉifoje ni ja uzos kanalon de "Youtube" por kunigi ĉiujn retojn sub la sama malfamula flago. Fakte, pri ĉi tio, ni ŝatus inviti ĉiujn Esperantistojn imiti nin, eble ne laŭvorte, sed ja iomete, ni ĉiuj bezonas interesajn voĉojn sur niaj semajnaj podkastaĵoj, ni ĉiuj bezonas interesajn "Youtube" kanalojn, ni ĉiuj bezonas artistojn en la komunumo, ĉiaj artistoj kaj urĝe.

**F: Artistoj estas ja necesaj en ĉiuj kulturoj kaj komunumoj. Ĉu vi jam invitis artistojn al via programo?**

**LM:** Jes, certe, sed ne tiel kiel la kutima esperanta artisto, kiu estas ĉu verkisto ĉu kantisto. Ni antaŭ kelkaj monatoj invitis kaj intervjuis tatu-artistinon el Meksikurbo nomita Itzja, kaj ŝi rakontis al ni pri sia laboro, dum ni ĉiuj parolis ankaŭ pri niaj tatuoj, pri la stiloj kiujn ni plej ŝatas, pri la kritikoj al tatuarto, pri ŝia teĥniko kaj multe pli. Eĉ mi memoras ke ŝi rakontis pri ŝia unua kliento, kiu estis ŝia patrino! Ni ege ĝojas scii ke inter ĉiuj esperantistoj ekzistas almenaŭ unu kiu scipovas tatui, kaj plejeble, ke tiu tatuistino kapablos pentri la ridantan vizaĝon de Zamenhof sur nian dorson.

**F: Kion vi esperas por la venontaj jaroj pere de la Malfamuloj? Ĉu vi esperas iĝi famaj?**

**LM:** Tio estas ja tikla demando por ni. Ni mem ne volas esti famuloj, sed ni ja volas kundividi niajn opiniojn, ĉar ni ege certas ke niaj opinioj gravas (kaj kiu ne kredas ke sia opinio gravas?!), kaj eĉ plej, ni volas kundividi la ekziston de mojosaj malfamuloj ene de Esperantujo. Ni ankoraŭ en oftege invitas homojn al nia programo, sed tio estas nia plano. Ni volas havi almenaŭ unu gaston parolante pri sia laboro, pri sia pasio, ĉiu du epizodoj minimume, sed eble tiu celo estas ankoraŭ iomete for. Krom tio, nu, esti aŭskultataj kaj kritikataj estus la plej bona rezulto por nia ŝatokupo.

**F: Krom artistoj, kiajn aliajn gastojn vi ŝatus ricevi?**


**LM:** Nu, ni ankaŭ ĉijare ricevis esperantiston kiu estas samtempe la hotelestro de la hostelo Esperanto en Fortalezo, Brazilo. Li rakontis al ni pri sia negoco, kaj pri sia esperantismo, kaj ni parolis tiam pri niaj riĉulaj fantazioj, pri niaj fetiĉoj kaj revoj ligitaj al mono kaj laboro. Ni ne havas profilon invitindan kaj profilon malinvitindan. La plejmulto da nia aŭskultantaro estas malfamuloj, do, ni volas ilin, kion ajn ili faru, por rakonti al aliaj esperantistoj pri siaj projektoj kaj pri siaj movadoj. Ekzemple, dum la tria sezono ni jam certas ke ni havos iluziiston por paroli pri magio kaj iluzio. Ankaŭ poste ni havos normalulinon kiu asertas koni la sekretojn de amo ene de Esperantujo. Ankaŭ iam ni havos tiun programon kun fanatikulo pri "Star Wars" (Stelaj Militoj)… kaj kiu scias? Eble ni havos iam la Ĝeneralan Sekretarion de UEA por intervjuo.

**F: Perfekte, do, ĉu vi volas diri ion al niaj legantoj, kion mi en demandis al vi?**

**LM:** Jes, certe. Iru apogi ĉiom da projektoj eble, eĉ pli tiujn kiuj dependas de malgrandaj teamoj kaj en havas apogon de institucioj. Ni ne estas lando, ni ne havas registaron, ni ne devas supozi ke UEA kaj TEJO faros ĉiom da laboro necesa por krei pli internacian kulturon por Esperantujo. Esperantistoj mem havas tiun povon, kaj ni povas ja apogi niajn instituciojn kaj apogi aliajn projektojn. Ni ne diras ke vi malaliĝu de UEA, tute ne! Ni nur invitas vin vidi ĉiujn aliajn projektojn kiuj ne necese rilatas al niaj institucioj, kaj apogi ilin. Ni havas hostelon, matracan industrion, psikologiistojn, artistojn, kaj plurajn spertulojn kaj profesiulojn kiuj disas kaj neniam konektiĝas kun la cetera Esperantistaro, kaj ĉiuj kune povus ja krei mirindan ŝokon en la ne-esperanta publiko, se ni laborus kune. Sed tio estas ja utopia penso nia.

**F: Dankegon pro via tempo kaj viaj vortoj. Kie ni povas trovi vin?**

**LM:** Niaj retejoj aperas kiel "La Malfamuloj" ĉe "Instagram" aŭ "Malkongreso" ĉe "Facebook". Vi povas trovi nin ankaŭ ĉe "Anchor", "Spotify" kaj pluraj aliaj podkastservoj per la vortoj "la Malfamuloj". Ankaŭ sekvu niajn fratajn projektojn "Sekreta Frataro" kiu ĵus publikigis retvendejon tute vizitindan, ĉe "Instagram" kaj "Facebook". Kaj, rilate, ni havas "sekretan" grupon ĉe "Facebook" nomita "Malfamula Sekto" – kio estas ena ŝerco naskita dum iu epizodo – sed ĝi ne estas sekreta (nur diskreta), do ĉiuj povas trovi ĝin senprobleme.







Pietro von Herts



Foto: Dosiero prenita el interreto <https://regozijodoamor.files.wordpress.com/2012/10/sombrio.jpg>

# TERURA VIZIO

Sylvain-René de la Verdière

"Kion vi vidas?" li demandis al ciganino.

"Iun... genuantan proksime al arbo. Li rigardas supren, brakojn etenditajn al la ĉielo. Li kriegas, kaj ŝajnas suferi abomene! Mi vidas alian viron,kiu... ho Dio!"

Ŝia voĉo komencis esprimi neelteneblan teruron.

"Li levas hakilon! Li murdas la alian, sango fluegas de la armilo! Estas abomeninda sceno! Vizaĝo... monstra vizaĝo rigardas ilin. Ĝi similas al Satano! Flamoj eksplodas el lia gorĝo!

- Nu! Ĉi tiuj vizioj konsolas min. Komprenu, la kritikistoj diris, ke mi ruiniĝis, sed vi donas al mi bonan kialon por daŭrigi sur ĉi tiu nova vojo, kiu estas la abstraktaĵo."

"Ŝia voĉo komencis esprimi neelteneblan teruron."

# LA VERDA SKARABO

Saluton legantoj de Fanzeranto. Kun ĝojo mi eksciis pri la rea ekapero de Fanzeranto al kiu mi kontribuis per kelkaj receptoj antaŭe. Tiam tio okazis sub la retpaĝaro VeganArto kiun mi prizorgis dum pluraj jaroj. Se mi bone memoras, dum ĉirkaŭ 7. Tamen, aferoj okazas en la vivo, tre ofte fremdaj al nia memvolo kaj la mondo interreta rapide evoluas. Ni esperantistoj ankaŭ devas scipovi evolui kun la mondo ne 100 jarojn poste. Kvankam VeganArto posedis belan logotipon, kiun mi aparte ŝatis kaj dankis al ĝia kreinto 12 ĝi ne ĉiam estis haste aktualigita teknike kaj bedaŭrinde miaj scioj pri informadiko estas tre bazaj kaj pri tio okupiĝis ulo kiu preskaŭ kaj subite kaj eĉ tute neatendite de mi preskaŭ forlasis Esperanton kaj alkroĉiĝis al la angla. Kaj la servilo kiu gastigis la retpaĝaron apartenis al regiona E-asocio kiun li ne plu zorgis. Pluraj farendaĵoj atendis esti pritraktitaj ekde la naskiĝo mem de la retpaĝaro kaj eĉ la nomon mem ni ne elektis sed ulo kiu pli frue kabeis kaj verŝajne eĉ ne plu veganas kaj ne parolas Esperanton. Tamen, mi ne volis okazigi malplenon kaj decidis krei konton ĉe "Instagram" por esti proksima de multaj esperantistoj kiuj ricevus ĝustatempe la novajn publikigaĵojn. Ĝia nomo estas "Verda Skarabo". Temas pri nur "instagrama" afero, eble estontece ĝi flugus al aliaj sociaj retejoj sed tio estus tro por unu homo. Kvankam ĝis nun la retpaĝaroj pri kuirarto estas sufiĉe popularaj, la normala tendenco estas la sociaj retoj kie ĉiuj moviĝas kaj aperas enhavo eĉ sen nia antaŭa serĉado. Se diri la veron VerdaSkarabo ankoraŭ tre foras de la ideala komenca celo sed iom post iom mi aldonos novajn enhavojn. Mi volas publikigi fotojn kun receptoj kaj ankaŭ etajn videojn en Esperanto pri veganismo kaj pri manĝaĵoj. Tiamaniere ekzistos denove spaco tute vegana en Esperantujo kaj mi volas ligi ĝin al mia persono, t.e. Andy Hernandez, kiu verkas la artikolon ĉar mi volas krei estontece libron presitan pri veganaj manĝaĵoj teorie internaciaj sed ni vidu la finan rezulton. Mi estas profesia vegana kuiristo kaj laboras en sufiĉe konata kaj aprezata vegana restoracio en Madrido kaj surbaze de miaj ĉiutagaj esploroj volas kontribui al la movado per sanaj, amuzaj, facilaj kaj bongustaj manĝaĵoj. Se vi ĝuas enhavon en Esperanto, prepari manĝaĵojn aŭ nur subteni la movadon, mi petas vian aliĝon, komenton, kuraĝigon, ne nur al mia paĝo sed de aliaj laboremaj esperantistoj kiuj entuziasme uzas sian tempon por ni ĉiuj, la esperanta komunumo.




Foto: Dosiero de la aŭtoro.

# PIZKREMO KUN SOJRIKOTO

Ĉi tiu plado estas du kolora, precipe verda kaj poste blanka. Preparmaniero simpla, facila kaj bongusta. Kiel esperanto mem. Por fari ĝin vi bezonos malmultajn ingrediencojn:

Por la rikoto:
1 litro da sojlakto
6 supkuleroj da pomvinagro aŭ citronsuko
Salo

Pizkremo:
1 taso da pizoj
Pulvorigitaj bazilio kaj ajlo (ambaŭ opcie)

Unue ni devas boligi la sojlakton. Aldoni la vinagron kiam boliĝanta, salon, kirli kaj lasi ĝin ripozi ĉ. dek minutoj.

Dume boligu la pizojn kun akvo kovranta ilin, iom da oleo, ajlo kaj bazilio pulvorigita aŭ natura, laŭ via plaĉo.

Ni revenu al la rikoto:
Filtru la likvaĵon kaj dum la kremo fariĝas laŭ ĝin plu perdi likvon. Ĝi fariĝos pli kompakta. Tiam ĝi pretos.

Kirlu la pizojn, se bezonate aldonu iom pli da salo. Ĉion servu samtelere por miksi dum manĝado. Mi rekomendas manĝi kun pano.

Bonan apetiton!

SEKRETA FRATARO DE LA ESPERANTISTOJ

## Ni parolas Esperanton!!!

# NETRADICIAJ ESPERANTAĴOJ

## frataro.com.br

**Broĉoj ⋆ Reklamstrioj ⋆ Magnetiloj**

**Kruĉetoj ⋆ Presaĵoj ⋆ Ŝildoj**

Strangaj, bizaraj kaj eĉ mojosa Esperantaĵoj, vi trovos ĉi tie!

esperanta ⋆ ambasadejo ⋆

Esperanta Ambasadejo

Embaixada do Esperanto

**Esperantejo en Sudminasa Regiono**

Rua Lourdes Souza Santos, 156 - Loja

Colina Verde - Pouso Alegre - MG - Brasil

CEP: 37561-101

**esperanton@gmail.com**

www.linguainternacional.org

facebook.com/esperantaambasadejo

instagram.com/esperanton

NOVA DOMO

IMOBILIÁRIA




LOPOĈO

ĈU VI VOLAS LUDI ESPERANTE?

# LOPOĈO

scastelbou.wixsite.com/lopocho